



La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia novembra kunveno

DATO: Vendredon, la 17-an de novembro 2006, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second Floor, Room A
(inter Bowling Green and Exchange Place), NYC

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Tomaso Eccardt prelegos pri:
*300 milionoj da usonanoj – ĉu festindaĵo aŭ
lamentindaĵo? Ĉu scienco ne finfine solvis troloĝatecon? ★*

Protokolo de la kunveno de la 20-a de oktobro 2006

La oktobra kunveno estis nia ĉiujara Malfermita Domo, kiam ni invitas gastojn veni por lerni pri Esperanto. Ĉi-jare alvenis 12 gastoj. Stuart GREEN oficiale malfermis la kunvenon je la sepa, en la angla lingvo. Ĉeestis entute 20 personoj. Sekvis pluraj anglalingvaj prelegoj pri Esperanto. Tom ECCARDT prezentis mallongan enkondukon. Rolando MARKS parolis pri personaj spertoj kiel lernanto de Esperanto. Jeff BLAKESLEE parolis iomete pri la historio de nia lingvo. Poste Stuart prelegis pri la ĝojoj de Esperanto kaj de la

Esperanto-movado. Fine Tomaso parolis pri nia klubo kaj pri siaj Esperanto-lecionoj.

Post la prelegoj, ĉiu ĉeestanto prezentis sin. Sekve la filmo de Pilar RAU pri nia klubo estis prezentata.

Fine la membroj mallonge traktis klubajn aferojn en Esperanto. Oni akceptis la protokolojn de la lastaj du kunvenoj. Tomaso anoncis, ke li bezonas prelegantojn por venontaj kunvenoj. Oni ankaŭ memorigis la kandidatigan komitaton prepari por la estara voĉdonado en decembro.

Je la naŭa horo Stuart oficiale fermis la kunvenon. ★

Protokolis: Jeff BLAKESLEE

Esperanto ĉe IBM Centro

La 5-an de novembro, naŭ novjorkaj esperantistoj renkontiĝis por babilo. La ĉefa temo, tamen, estis kiu povus fari la laboron de Rochelle, kiu eks-sektretariigis. Bonŝance, Marta Bergonzoli volontulis preni tiun postenon, kaj kun la helpo de Nancee Medrano, *Prismo* daŭre estos sendata. ★

– Tom ECCARDT



Sekvas parto de rankonto de la komika verkisto PG Wodehouse (ŭdhaus) kiu ekskopirajtiĝis. Mi esperas fini la tradukon en estontaj numeroj de Prismo.

— Tom ECCARDT

Lasu tion al Jeeves

Jeeves – mia servisto, fakte, mia valetto – vere estas eksterordinara ulo. Tiel kapabla. Sincere, mi ne scius kion fari sen li. Li similas pli malpli al unu el tiuj uloj kiuj malgaje sidas kaj fikse rigardas trans la krenelarojn de la Pensilvania Stacidomo en la loko markita “Informejo”. Vi konas la ulojn. Oni alproksimiĝas ilin, demandante, “Je kioma horo foriros la venonta trajno por Kukurbetopolo, Tenesio?” kaj ili respondas sen pensi “14:43, deka kajo, transiru ĉe Sanfransisko.” Kaj ili ĉiam pravas. Do, Jeeves donas precize la saman impreson de ĉioscio.

Kiel ekzemplon, mi mencias mian matenan renkontiĝon en Bond Strato kun Monty Byng, kiu portis furoregan plejdan kompletan. Mi tuj antaŭscius, ke mi ne plu kontentos, ĝis kiam mi havos similan kompletan. Mi elŝovis de li la nomon de la tajloro, kaj antaŭ la sekva horo oni jam komencis prepari unu por mi.

“Jeeves,” mi diris tiun vesperon. “Mi mendis plejdan kompletan kiel tiu de S-ro. Byng.”

“Malprudente, sinjoro,” li diris firme. “Ĝi malkonvenas al vi.”

“Kia sensensaĵo! Tiu estis la plej valida decido kiun mi faris dum jaroj.”

“Maltaŭga por vi, sinjoro.”

Do, mallonge dirite, oni liveris la aĉaĵon, mi vestis ĝin, rigardis min en spegulo, kaj preskaŭ svenis. Jeeves perfekte pravus. Mi similis aŭ komikiston aŭ bukmekron. Tamen Monty ŝajnis bonege vestante la saman aĵon. Tiaj aferoj simple estas la misteroj de la vivo kaj jen!

Sed ne estas nur tio, ke la opinioj de Jeeves pri vestaĵo estas neeraraj, kvankam, kompreneble, tio estas plej grava. Tiu viro scias ĉion. Temis pri la informeto kiun mi ricevis pri la ĉevalkonkurso “Lincolnshire.” Mi jam forgesis kiel mi ricevis la informon, sed ĝi ŝajnis esti la ardega veto.

“Jeeves,” mi diris, ĉar mi ŝategas la viron, kaj mi emas helpeti lin kiam aĵo eblas, “se vi volas gajni saketon da mono, privetu Mirinfanon en la “Lincolnshire.”

Li kapneis. “Mi preferus min deteni, sinjoro.”

“Sed temas pri la aŭtentikaj varoj. Mi vetos eĉ mian ĉemizon.”

“Mi ne rekomendus tion, sinjoro. Tiu besto ne estas gajnonta. A la dua loko strebas la stalo.”

Reala rubo! mi pensis, kompreneble. Kiel diable Jeeves povus sperti pri tio? Tamen vi scias, kio okazis. Mirinfano antaŭis la ĉevalaron ĝis kiam li respiris sur la findraton, kaj Bananbenjeto tuj aperis kaj venkis lin je nazlongo. Mi hejmenrapidis kaj sonorigis por Jeeves.

“Ĉi-poste,” mi diris, “neniun paŝon pli sen via konsilo. Ekde nun konsideru vin la cerbo de la domo.”

“Ege bone, sinjoro. Mi strebos kontentigi.”

Kaj li kontentigas! Mankas al mi mem granda cerbo; mia balono fakte ŝajnas esti desegnita

ĉefe kiel ornamentaĵo, sed lasu al mi kvin minutojn por preparoli ion kun Jeeves, kaj mi estas preta konsili iun aĵon pri io aĵn. Kaj por tio, kiam Bruce Corcoran venis al mi kun siaj malfacilaĵoj, mia unua agado estis sonorigi kaj respondecigi la uleton kun la ŝvelanta frunto.

“Lasu tion al Jeeves,” mi diris.

Mi unue ekkonis Corky kiam mi venis al Novjorko. Li estis kamarado de mia kuzo Gussie, kiu amikaris kun ulgrupo laŭ Washington Square. Mi ne scias ĉu mi jam menciis tion al vi, sed la kialo ke mi lasis Anglujon estis, ĉar mi estis sendita ĉi tien de mia onklino Agatha por peni preventi la junan Gussie edziĝi kun junulino de la vodevila teatro, kaj mi tiom fuŝis la aferon, ke mi decidis, ke estus pli utile resti iomete en Usono ol reiri kaj senfine preparoli la aferon kun mia onklino. Do mi forsendis Jeeves por serĉi decan apartamenton kaj mi kvietiĝis por iom da ekzilo. Mi devas agnoski, ke Novjorko estas unuranga loko por ekzilo. Ĉiuj traktis min bonege, kaj ŝajne okazis ĉiam multaj aferoj, kaj mi estas riĉa klaŭno, do ĉio en ordo. Uloj prezentis min al aliaj uloj, kaj tiel plu, kaj tiel plu, do, post nelonge, mi konis bandojn de la ĝustaj uloj, kelkaj el kiuj elspezis monegon por domoj laŭ la Parko, kaj kelkaj kiuj ŝparis lungason en siaj hejmaĉoj laŭ Washington Square – artistoj kaj verkistoj kaj tiaj plu. Cerbaj klaŭnoj.

Corky estis unu el tiuj artistoj. Portretisto, li nomis sin, sed li ankoraŭ pentris neniun portretan. Li sidis kiel flankulo kun kovrilo sur siaj ŝultroj atendante okazon eniri la ludon. Vidu, la ruzo pri portret-pentrado – mi esploris la aferon iomete – estas, ke oni ne povas komenci pentri portretojn ĝis kiam homoj petas portretojn, kaj homoj ne petas portretojn ĝis kiam oni jam pentris sufiĉe da portretoj. Tio malfaciligas la aferon por oni. Corky sukcesis gajni la vivon desegnanante, de tempo al tempo, por la ĵurnalaj bildstrioj – li havis veran talenton por komikaĵoj, kiam inspirita – kaj designante littukojn, seĝojn, kaj tiajn por anoncoj. Lia precipa fonto de enspezoj, tamen, devenis de petado de riĉa onklo – iu Alexander Worple, kiu negociis en juto. La eco de juto estas iom malklara al mi, sed ŝajne ĝi estas sufiĉe dezirata de la popolamaso, ĉar Sr-o Worple jam gajnis sufiĉe grandan sakon per juto.

Nu, pluregaj uloj opinias, ke havi riĉan onklon provizas facilan vivon: sed, laŭ Corky, tio efektive ne okazas. La onklo de Corky estis fortikulo, ŝajne senmorta. Li vivis jam kvindek unu jarojn, kaj ŝajnis, ke kiam li estos finludinta, liaj poentoj estos multe pli nombraj. Ne estis tio, tamen, kio afliktis la kompatindan Corky, ĉar li ne estis antaŭjuĝanto – li ne ĉikanis la vivadon de sia onklo. Tio, kio ŝagrenis lin, estis la maniero kiel la onko turmentadis lin.

La onklo de Corky, fakte, ne volis ke tiu artistu. Li opiniis, ke lia nevo havas neniun da tia talento. Li ĉiam urĝis lin rezigni pri arto kaj komenci karieron en la fondo de la jutnegoco kaj grimpi supren. Ŝajnis, ke juto obsediĝis ĉe li. Li atribuis spiritan gravaceon al juto. Kaj Corky diris, ke kvankam li ne scias precize tion, kion oni faras en la fondo de jutnegoco, tamen ke lia

Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

Novembro 2006

17

ESNY KUNVENO

Tom Eccardt prelegos pri: *Ĉu scienco ne finfine solvis troloĝatecon?*

Vendredon, 6:30 pm ĉe UFT

Decembro

3

Tagmanĝo

Dimanĉon, 1:00 pm ĉe IBM Plaza

(Limdato por kontribuajoj por Prismo 159)

15

ZAMENHOFA FESTO

Vendredon, 6:30 pm ĉe UFT

United Federation of Teachers (UFT)

50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)

“IBM” Building Atrium

590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

instinkto konstatis, ke tio estas io tro bruta por vortoj. Krome Corky vere kredis je sia kariero kiel artisto. Iun tagon, li diris, li furoros. Inter-tempe, per tutaj siaj taktoj kaj persvadopovo, li instiĝis sian onklon provizi malbonvolege etan trimestran monkvanton.

Li ne ricevus eĉ tion, se lia onklo ne havus hobion. Sr-o Worple estis stranga je tiu aspekto. Laŭ mia observado, la tipa usona industriestro faras nenion ekster la horoj de negoco. Post kiam li eksterenmetas la katon, kaj ŝlosas la oficejon por la nokto, li reeniras komaton, de kio li elvenas nur por ekreindustriestriĝi. Sed Sr-o Worple en sia libertempo estis tio, kion oni nomas ornitologo. Li estis verkinta libron “Amerikaj birdoj,” kaj estis verkanta plian, “Pliaj amerikaj birdoj.” Kiam li estos fininta tiun, oni supozis ke li estus verkanta trian, kaj tiel plu, ĝis kiam la provizo de birdoj elĉerpiĝos. Corky iradis al li ĉiun trian monaton kaj aŭskultadis lin paroli pri amerikaj birdoj. Al Worple ŝajne ne gravis kion oni farus, se oni lasis lin paroladi pri sia preferata temo, do tiuj babiladoj bonordigis la monkvanton de Corky almenaŭ dumtempe. Sed estis aĉege por tiu kompatindulo. Ekzistis la timiga suspenso, kompreneble, sed krome, birdoj – krom se rostitaj kaj akompanitaj de bondata botelo – tedegis lin.

Por kompleti la karakteran etudon de Sr-o Worple, li estis viro de necerta temperamento, kaj li emis konsideri Corky kiel kompatindulon kies iu aĵo paŝo ien aĵn estis plia pruvo de ties denaska idioteco. Mi imagas, ke Jeeves opinias sammaniere pri mi mem.

ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto
Stuart Green
(631) 751-5683

Korespondanta Sekretariino
Rochelle F. Grossman
(718) 457-1490

Protokolisto
Jeff Blakeslee
(718) 383-2715

Vicprezidanto
Scott Page
(212) 663-4896

Kasistino
Sofiya Soskina
(914) 813-2495

Program-Direktoro
Thomas Eccardt
(212) 477-6516

Novjorka Prismo

Numero 158 – Novembro 2006

ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>

Redaktoro
Jim Medrano
(212) 982-5029

Subredaktoroj
Thomas Eccardt
Nancee Medrano

Desegnistino
Mary Pulley

Sendu kontribuojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com

© 2006 Esperanto Society of New York